Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO**

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-10 sendita el Marakeŝo, la 9an de aprilo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Plurnacia kongreso kaj AMO-seminario en Burundo

De la 26-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 2018, en Nyanza-Lac, en la suda parto de Burundo, kuniĝis 67 aktivuloj el diversaj provincoj de Burundo, DR Kongo, Tanzanio, Sud- Afriko kaj Zambio, por partopreni la 3-an Burundan kongreson de Esperanto kaj la 46-an AMO-Seminarion. La programoj de ambaŭ aranĝoj estis gviditaj de spertaj esperantistoj el Burundo, DR Kongo kaj Suda Afriko (la Kunordiganto de la Afrika Komisiono).

Oni spertis trejnadojn pri bona varbado, kiel fondi kaj disvolvi novan lokan E-klubon, financa evoluigo de lokaj kluboj aŭ kiel fariĝi finance memstara E-asocio, kiel organizi kaj diskonigi eventojn – movade kaj ekstermovade, strategio kaj taktiko por krei E-klubon en lernejoj, kiel eluzi Esperanton en turismo aŭ komerco, kaj kiel organizi Esperanto-eventojn. Poste, okazis Internacia Ekzameno de ILEI/UEA: por la elementa nivelo, aliĝis 16 kandidatoj el kiuj 10 sukcesis (kun 60%); por la meza nivelo, aliĝis 6 kandidatoj kaj 3 kandidatoj sukcesis (kun 60%). Okazis kvintaga kurso por 66 komencantoj kaj inter ili 64 sukcesis en la fina ekzameno. Vendredon, tuj post la futbala ludo inter esperantistoj kaj loka veterana futbalista teamo, okazis balotado por la nova estraro de ANEB (la landa asocio), JEBUO (Junulara Esperantista Burunda Organizo) kaj BIS (Burunda ILEI-sekcio).

Ni dankas al ĉiuj, kiuj finance, materiale, ĉeeste kaj morale subtenis nin. SABIYUMVA Jérémie; Vortoj = 229



Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.